
# APOTEOZO EN BARCELONO



La dispono de la Dresdena U.E. Kongreso organizi por la jaro 1909 universalan kongreson de Esperanto en Barcelono mobilizis la geesperantistojn de nia lando por la organizado de la evento kun la celo ke ĝi estu kiel eble plej brila. Ankaŭ la aŭtoritatoj de la urbo alprenis la respondecon dece gasti la esperantistajn gekongresanojn el la tuta mondo. La urbestro de Barcelono disponis ke la Urba gvardio lernu Esperanton. La firmo Hispano Films promesis filmi la Barcelonan kongreson, kio estus bonega ŝanco por la postkongresa propagando pri Esperanto.

Dume plu estis en la lando kursoj pri la internacia lingvo organizitaj de la jam ekzistantaj E-grupoj kaj estis kreitaj, antaŭ kaj post la kongreso, pliaj E-grupoj kaj societoj, inter ili iu Virina Esperanta Grupo. Sed pli grave por nia historio estas tio ke la 4an de junio de tiu jaro oficiale naskiĝis **Astura Esperanta Asocio**.



lo de Cartagena; kaj en Kordovo kies unua Prezidanto estis Luciano Gisbert kaj Sekretario Cristeto Rodriguez. Specialan mencion ni devas fari pri la fondiĝo de rondo en la Astura Regiono, sub la nomo "Astura Esperanta Asocio", en strato Los Morales de Gijón, numero 99. Tiu Esperanta Rondo estis fondita de membroj de Katolika Centro de la dirita urbo (veterana societo fondita en 1882), kaj disvolvis ilian aktivadon komune, fakte la Esperanta rondo funkciis kiel Sekcio de la Katolika Centro. La organo de ambaŭ societoj estis "El Principado", redaktita en hispana lingvo, kaj la esperantistoj normale plenigis du paĝojn de tiu bulteno, de tempo al tempo parte en Esperanto. La unua Prezidanto de Astura Esperanta Asocio estis S-ro Francisco Menéndez Rua, postenon kiun li okupis dum multaj jaroj. Tiun Esperantan Rondon oni fondis, ĝuste, la 4an de Junio.

Eltranĉaĵo de **Analoj de la esperanta movado en Hispanujo**

La longa tempo pasinta de tiam kaj la agitata vivo de tiu organizaĵo igis ke ne eblis konservi en nia arkivo dokumentaron de la komenca etapo de la grupo kaj akton de ties fondiĝo. Pri tiu grava okazintaĵo nun ni disponas nur je la informo provizita de la verko **Analoj de la esperanta movado en Hispanujo**. En ĉi tiu paĝo ni prezentas bildon de eltranĉaĵo de la 43a paĝo de tiu libro, en kiu oni raportas pri la fondiĝo de la ĥiĥona E-grupo. Ĝi informas nin ke tiu esperantista rondo funkciis en la ejo kaj kiel sekcio de alia organizaĵo, konkrete la Katolika Centro. La unua prezidanto de Astura Esperanta Asocio estis Francisco Menéndez Rúa.

Ni ne scias kiam, kie kaj kiel esperantiĝis la unuaj membroj de tiu unua E-grupo de Asturio. Dubindas ke iu(j) el ili partoprenus en iu(j) el la kvar ĝistiamaj universalaj kongresoj de Esperanto, sed ŝajnas ke en tiu jaro 1909 almenaŭ du membroj de **AEA** partoprenis en la Kongreso de Barcelono okazinta malmultajn monatojn post la fondiĝo de la grupo. La numero 70a de la gazeto **LA SUNO HISPANA**, kiu raportis pri la 5a Kongreso universala, prezentas liston de la delegitoj kiuj salutis la kongresanaron kaj inter ili aperas la nomo (Sro Fraga) de iu asturiano, sed li ne aperas kiel membro aŭ delegito de **AEA** sed de la astura lingvo.

Temante pri la kongreso en Barcelono indas diri ke ĝi estis eĉ pli brila ol la kvar antaŭaj universalaj kongresoj. Tralegante la priskribon de la kongresaj sesioj kaj de la intervenoj de Zamenhof, kiujn detale transskribas la menciita verko **Analoj de la esperanta movado en Hispanujo** kaj de la numeroj de **LA SUNO HISPANA** de la lastaj monatoj de 1909, oni povas percepti ke la Majstro kaj ĝenerale la tuta ĉeestantaro troviĝis en stato de granda eŭforio, kvazaŭ ekstazo. Ĉio ŝajnis indiki ke la popolo kaj ties aŭtoritatoj bone akceptadis Esperanton kaj ke la afero antaŭeniradis “per flugiloj de facila vento”. Fakte, tiu facila vento kaj bona